

Akrostika Soneto

— rimgratule al Humphrey Tonkin

01.en la fama nomlisto

UEA centjariĝis en 2008. Supozeble, en la pasinta jarcento funkciis dekoj da prezidantoj de UEA. Pro la limigo de spacbaro kaj informomanko, ni, izolite senscia, ne povis trovi la tutan nomaron de la prezidantoj, koni iliajn meritojn kaj admire saluti pro ĉio kion ili faris por nia Esperanto-movado. Ni scias nur nemultajn, kiujn ni vidis, aŭdis aŭ legis. Nature tiuj el estraro de UEA, kiuj venis al Ĉinio dum la du Pekinaj UK (1986, 2004), pli profunde impresis nin. Inter ili ja troviĝis Humphrey Tonkin.

La nomo de Tonkin troviĝas en la nomlisto de la “Cent Plej Famaj Esperantistoj” farita de LF-koop. okaze de la nova jarmilo sub enketo. Kaj la unufraza konigo pri Tonkin estas: “La plej grava UEA-gvidanto post Ivo Lapenna.” (noto1)

02.ekkoni la nomon Tonkin

Laŭ mia aŭdaca konjekto, Tonkin neniel povis imagi aŭ scii, kiam kaj kiel mi ekkonis lian nomon. Tio okazis en 1972. Jes, kiel ĉinoj nomis, en la “Katastrofa jardeko” de la Granda Proleta Kultura Revolucio (GPKR, 1966-1976), en la severa tempo silentiga kaj mutiga por la ĉina publiko! Interrompiĝis ĉiaj interkomunikoj kun esperantistaj s-anoj, ĉu enlandaj aŭ eksterlandaj. Tiam Armand Su(1936-1990), la ĉina Esp-a poeto, jam estis enkarcerigita kondamnite je 15 jaroj da malliberigo. Mi kaj miaj esperantistaj geamikoj ankaŭ suferis persekutadon pro nia agado por Esperanto. Sed mia brava amiko Jariĉ(1937-1999) tiam ankoraŭ daŭrigas sian korespondadon kun fremdaj esp-istoj. Post multfoja ne-laŭleĝa traserĉado de loĝejo, li ankoraŭ konservis (mirakle!) duonon de UEA-jarlibro (la alia duono, la adresaro de delegitoj, jam estis elŝirita kaj konfiskita de la ĉina doganejo) kaj unu numeron de <Esperanto>, organo de UEA. Tiujare la 57-a UK okazis en usona urbo Portland, kaj sur la kovrilo de la revuo estis fotoj de la gastiganta lando. Ni okazigis sekrete la Zamenhof-festan kunsidon en la hejmo de Jariĉ, malantaŭ la fenestroj firme ŝirmitaj de kurtenoj. Kun rondigitaj okuloj ni soife rigardis tiujn rarajn esperantaĵojn. De tio ni akiris gutojn da informoj pri la internacia Esperanto-movado, kaj ankaŭ la nomon de Tonkin. Post kiam mi komencis memlerni Esperanton en 1956, tio estis la unua fojo kiam mi propraokule vidis la organon <Esperanto> kaj la jarlibron de UEA. Tial mi havis neforgeseblan profundan impreson. Ke la nomo de Tonkin vekis nian atenton, tion kaŭzis unue la aĝo (sam-generacia), due la jaro 1956 (de nia esperantistiĝo), trie lia nacieco angla/usona.

03. ĉu nur hazarda

Sed pli ekster ĉies atendo estis la sekvaj eventoj. Ni okazigis Uhanan Kolokvon somere de 1978 (samdate kun la 63-a UK, mallongige ankaŭ UK) en la hejmo de Jariĉ.

La foto de nia kolokvo poste aperis sur la kovrilo de la februara numero 1979 de <Esperanto> , eĉ kun okulfrapa ĝojkria slogano: "Ĉinoj (re)venas!".(noto2) Samjare ni fondis en 1979-05-01 Hubei-an Esperanto-Asocion, kiu estis la unua provinc-nivela Esp-a asocio en la centjara historio de ĉina Esperanta movado (1909-) kaj finis la eraon kiam ekzistis nur unika ĈEL en ĉina ĉefurbo Pekino. Komenciĝis nova erao kiam fondiĝis pli ol cent Esp-asocioj diversnivelaĵ tra la tuta Ĉinio. Vigle antaŭenmarŝas ĉina Esperanto-movado kaj Ĉinio unuafoje gastigis la 71-an UK en 1986. Mi rimarkas ke ĉiuj tiuj gravaj eventoj okazis en la mandato de Tonkin kiel prezidanto de UEA. Ĉu nur hazarda koincido?

04. kelksekunda interparolo

Fakte la tempo kiam ĉinoj sopiris gastigon de UK en Ĉinio, ja estis sufiĉe frua; ĉar la plej frua iniciativo tiutema aperis jam en 1908-08-29 (noto3). Dum longaj jardekoj mankis al la ĉinaj esp-istoj ŝanco praktiki Esp-an konversacion. Vivante longtempe en izoliteco, ĉinaj esp-istoj havis apartan admiron al tiuj s-anoj, kiuj parolas Esp-on tiel flue kiel en sia gepatra lingvo. En 1986 mi havis la feliĉon unuafoje partopreni en la pekina UK. Mi tre volas aŭskulti kiel paroli Esp-on diverslandaj esp-istoj. Tial mi elektis programeron "Laborkunsido de estraro de UEA". Tio certe ne estis tiel amuza. Sed mi rigardis ĝin tre rara ŝanco kiam mi povas aŭskulti Esp-an konversacion de plej elitaj s-anoj en nia movado.



Tiu labor-kunsido okazis atm en 1986-07-28, en la Hodler-ĉambro en 71-a UK. Mi anticipe atendis ekster la pordo de la kunvenejo, kun iom da maltrankvilo (ĉar mi ne scias ĉu la estraro permesus min apude aŭskulti). Tiam alvenis Tonkin, mi tuj rekonis lin kaj renkonte demandis al li ĉu mi rajtus ĉeesti kiel nura aŭskultanto? Siatempe mi kunportis ĉe mi mankopiaĵon de la pli-ol-600-paĝe dika <Esperanta Antologio>. Mi montris al Tonkin mian mankopiaĵon. Li foliumis tion kaj respondis senhezite, ke tiu laborkunsido de la estraro de UEA estas publika kaj malferma al ĉiu kiu volontus aŭskulti. Tio estas ĝis nun unika interparolo inter mi kaj Tonkin je sekundoj. Laŭ diro de ĉinoj, tio okazas laŭ antaŭdestino de foja renkontiĝo. Poste mi trovis ke tiun fojon en la kunvenejo troviĝis nur du ĉinoj: Dai Song'en kiel oficiala ĉeestanto kaj Guozhu kiel aŭskultanto.

05. impresiva aŭdĝuo

La dua fojo kiam mi aŭskultis publikan paroladon far Tonkin estis en 2004. Ĉijare UK refoje venis al Ĉinio(Pekino) kun kongresa temo: Lingva egaleco en

internaciaj rilatoj. Sidante en la kongresejo de la 89-a UK mi kaj amikoj absorbite aŭskultis. Ni estis atentokaptitaj precipe de tiuj pecoj rilate al Ĉinio, kiuj profunde impresis nin, ekz-e:

Ĉi tie en Ĉinio, oni investas grandegajn sumojn je la lernado de la angla, kun nur parte sukcesaj rezultoj — kaj nur por atingi la saman nivelon kiun la denaskaj parolantoj de la angla lingvo atingas kiel etaj infanoj. Kaj ju pli da ĉinoj lernas la anglan lingvon, des pli da avantaĝoj havas la denaskaj parolantoj de la angla kaj la anglalingvaj landoj.

Tiu sistemo, laŭ kiu la homoj el unu nacio estas devigataj uzi la lingvon de alia nacio por komunikiĝi internacie, estas malegaleca. Ĝi estas diskriminacia. (noto4)

Klarvido, saĝo kaj justamo de la parolanto estas komuna kun tiuj de multaj prudentaj kleruloj en Ĉinio, tamen kun pli da konvinkeco, ĉar la parolanto mem ĝuste estas unu el **la denaskaj parolantoj de la angla lingvo**.

Parolado de Tokin, eĉ tiel mallonga kiel tiu en la inaŭguro de Esperanto-Bosko (noto5), je nur centoj da vortoj, ankaŭ estas plena de bela sento, beletra stilo kaj poezia etoso. Kaj lia sprita gvidparolado en aŭkcio de Esperantaĵoj jam delonge efikis kiel fama marko en Esperantista rondo.

Dank' al la progreso de sciencoj kaj teknikoj, nun ni jam povas libere aŭskulti paroladojn de Tonkin per komputilo en interreto. Ĉijare mi jam plurfoje aŭskultis la festparolon en la 93-a UK (noto6) kaj (kun danko) tiun pri <la arto prelegi>. Ja vera aŭd-ĝuo!

06. varia sin-prezento

Tonkin estas tia homo kun vasta agadkampo, multaj fruktoj kaj plena de energio. Observi homon de tia speco estas ege malfacile, eĉ liaj familianoj ne sukcesis vidi lian plenan figuron; ĉar observo al homo tre similas observon al monto, reliefa, multfaca, ŝanĝiĝema. Malsamaj observantoj en malsamaj pozicioj, de malsamaj anguloj vidos malsamajn bildojn kaj akiris nesamajn impresojn. Ĉina fama poeto Su Shi (1036-1101) iam versis pri tio, ke

*Flank-vidate la mont' serpentas,
fronte — kruta montpinto tentas.
Proksime, fore, alte, base:
varie la mont' sin prezentas.*

— Skribita sur Tempomuro

Tamen, eĉ sen proksima kontakto, oni ankaŭ havas sian impreson kiel tiun pri famaj steluloj.

07. multe!

Mia impresoj pri Tonkin konverĝas en unu vorto: Multe!

Multefaca, multe travivi, multe pensi, multe paroladi, multe prelegi, multe agi, multe fruktdoni, multe funkcii, multe servi, multe kontribui, multmerita, multe da amikoj, multe da titoloj..... vere senkompara por ordinaraj homoj.

Mi provis listigi tion laŭ *Loke- Fake- Persone- Laste aperis*, sed apenaŭ sukcesis, ĉar la materialoj inundas kaj la paperoj ne sufiĉas! Ekz-e

Loke

Truro, Hartford, Novjorkio, Pensilvanio, Yale, Oksforda, Yale, Potsdam, Poznano, kaj prelegi en multaj landoj.....

Fake

Humanistiko, interlingvistiko, angla literaturo ,angla kaj kompara literaturo , Esperantologio, specialisto pri la renesanca periodo (ankaŭ Ŝekspiro).....

Persone

TEJO-prezidanto (1969-1971), Honora Prezidanto de TEJO , estrarano de UEA, vicprezidanto de UEA (1980-1986, 2001-2004), prezidanto de UEA (1974-1980, 1986-1989) , membro de la Honora Patrona Komitato (2007-2010); estrarano de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), redaktas la interlingvistan parton de la bibliografio de MLA, prestiĝa faka bibliografio pri lingvistiko kaj literaturscienco. Li kunredaktas la revuon *Language Problems & Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj lingva planado). Li verkis, redaktis kaj tradukis elstarajn esperantologiajn verkojn. Li grave kontribuis al la nuntempe aktuala statuto de UEA el 1980.(noto7);

kaj laŭ Carlo Minnaja: Tonkin estas universitata profesoro, eĉ rektoro, akademiano, denaska parolanto de la lingvo plej firmiĝinta en la mondo, literaturisto, oratoro, docento, preleganto, vojaĝanto, organizanto: li do estas escepte bona gvidanto por nin konduki lernocele tra la meandroj de nia esperantista vivo. Recenzo entute ne necesus: por vino bona, ŝildo ne bezona. (noto8)

Laste aperis

Kiel esp-ista erudito Tonkin esp-igis dramojn de Shakespeare(1564-1616). Li publikigis en 2003 *La vivo de Henriko Kvina'n* kaj en 2006 *La vintra fabelo'n*. Laŭ Ed Borsboom, “Per tio li faris interesan paŝon antaŭen, kreante trian kategorion de Shakespeare-tradukantoj en nia verda respubliko.” (noto9) Esp-igo de dramoj de Shakespeare komenciĝis ekde 1894 per *Hamleto* tradukita de Zamenhof (tio ankaŭ estas la unika frukto en la 19-a jc.). Sekvis 20 dramoj en la 20-a jc. kaj tiuj du tradukoj far Tonkin estas la plej novaj fruktoj tiuflanke en 21-a jc.

En 2006 UEA eldonis alian primovadan libron de Tonkin: *Lingvo kaj popolo*.

08.instrua kaj profitdona

Ĉar mi ne povas havi kaj legi la plenan verkaron de Tonkin, tial ĉio lia kiun mi povis trovi kaj legi, estas por mi tre kara. Mi trovis komunan trajton en verkoj kaj paroloj de Tonkin, ke ili ofte enhavas iom da riĉigita esenco, pensiga, remaĉinda, memorinda kiel sentenco instrua kaj profitdona. Ekz-e

pri bona kongreso

Esperanto ne povas esti sen movado, alie nur la aŭtoro mem aŭ malmultaj homoj komprenas tiun novan lingvon. Same, movado ne povas esti sen kunvenoj. Post mia esperantistio, komence estis nenia Esperanto-kunveno ĉe mi; poste, kun tempopaso,

ekaperis kunvenoj en nia ĉina Esperanto-movado, ili fariĝis de malgrandaj ĝis grandaj, de malmultaj ĝis multaj, kaj mi mem ankaŭ de ĉeesti ĝis okazigi. Sed, kia estas bona Esperanto-kunveno? Tonkin trafe respondis, ke
Bona kongreso estas tiu, kiu klerigas, paroligas, entuziasmigas. (noto10)
Kiel movadano mi tre ŝatas tiun koncizan respondon.

pri **laborplano** de asocio Tonkin tiel diris, ke

Ni ne rajtas ĝui la lukson de senplana laboro, kaj mi estas konvinkita ke la strategio de 1989 formas bonan bazon por estonta agado.(noto11)
Kiel prezidanto de Esperanto-asocio mi tre ŝatas tiun averton.

por **analizi situacion** Tonkin konigis al ni la metodon

FMEM (fortoj, malfortoj, ebloj, minacoj ; angle: SWOT = Strengths, Weaknesses, Opportunities, Threats).

Kiel inĝeniero mi tre ŝatas tiun sciencan metodon.

Mi tre amas Esperantan poezion. La unuaj Esperantaj poemoj, kiujn mi legis, estis versitaj de Zamenhof. Mi tre ŝatas kaj kolektis, eĉ ĉinigis kelkajn el ili. Sed dum jardekoj mi ne povis scii la naskiĝjaron de la fama himno <La Espero>. Mi skribis leterojn al multaj amikoj peti helpon. Sed neniu el ĉinaj esperantistoj povis doni al mi la solvon. Poste, mia intima amiko Harada Hideki el Japanio donacis al mi fotokopiaĵon de prelego farita de Tonkin en IKU en la 87-a UK, 2002. Kun ĝojo mi legis en p.47 jenan alineon ke

La kvina poemo, la plej fama el ĉiuj, *La espero*, estis publikigita en la tielnomata *Poŝa Lernolibro* por ruslingvanoj, kiu aperis en 1890.

Ĝi estis poste represita, kune kun la jam aperintaj *Mia penso*, *Ho, mia kor'*, *Al la 'Esperantisto'* kaj *Al la fratoj*, en *La libro de esperantisto*, kiun Antoni Grabowski eldonis en 1893. Ĉiuj tiuj poemoj ankaŭ aperis en *la Fundamenta Krestomatio* de 1903. (noto12)

Ho, dankon al Harada! Dankon al Tonkin!

09. rimgratulo

Tempo multefara, vivo indas kara. Tempo flugas ĉiam rapide ĉe homo merita. Jen baldaŭ venos la dato de 70-jariĝa jubileo de Tonkin. Amikoj planas eldoni por Tonkin festlibron. Kvankam mi havis kun Tonkin nur kelksekundan interparolon, tamen mi ankaŭ volas esprimi sinceran estimon el Ĉinio.

La naskiĝtago de Tonkin estis 1939-12-02. Laŭ ĉina moro ke viroj havu jubileon en la -naŭa jaraĝo (69-jara). Sekve 2008-12-02 estas la jubilea tago ĉinstile por Tonkin. Guozhu humile dediĉas akrostikan soneton kiel rimgratulon. Laŭ difino de PIV, akrostiko estas poemo en kiu la unua litero de ĉiu verso formas vorton, nomon. Jes, ni povas trovi la jubileulan nomon **Humphrey Tonkin** (en malhele verdaj literoj). En ĉina poezio estas abunde da pretaj poemoj por 70-jariĝa jubileo, sed tiu versita por difinita adresato en speciala formo havas apartan epiteton "ne- transmovebla" por alia persono. Do akceptu koran gratulon el ĉina Esperantujo!



Akrostika Soneto

— Rimgratule al Humphrey Tonkin

Humphrey Tonkin, vivo fruktdona,
universitat-prezidanto,
merita, elita, usona,
plurfoja UEA-gvidanto.

Humanistiko, fak-esploro,
renasanca literaturo,
erudicia profesoro.
Yale vidiĝis via spuro.

TEJO-kongreso en Britio.
okaze de aĝ' jubilea,
ni gratulas vin el Ĉinio
kun bondeziro samidea:

infinite verdajn sukcesojn,
novajn rekordojn kaj progresojn!
 (Guozhu. 2008-12-02)

Notoj

- (noto1) <http://www.esperanto.org/Ondo/H-100.htm>
(noto2) *esperanto*, 1979 februaro, 72-a jaro, n-ro 878(2)
(noto3) semajna revuo *La Tempoj Novaj*, 1908-08-29, n-ro 62, p.7-8
(noto4) <http://www.elfino.cn/albumo/009.htm>
(noto5) *Informilo de ĈEL*, 2004 n-ro 8-10, p.23
(noto6) <http://www.espero.com.cn/18s/93-a/08-uk-7.htm>
(noto7) http://eo.wikipedia.org/wiki/Humphrey_TONKIN
(noto8) Carlo Minnaja, *Lingvo kaj popolo*, La Ondo de Esperanto. 2007. №3 (149)
(noto9) Ed Borsboom, *Tonkin kaj Shakespeare*, La Gazeto n-ro 136, p.31
(noto10) <esperanto>, n-ro 1144, 2002-02.
(noto11) *Disvastigi, Utiligi, Konscii*. <esperanto>, n-ro 1089 (feb.1997), p.22
(noto12) Tonkin, "La Espero": Esperanto-poetoj pri Esperanto, prelego en IKU en la 87-a UK, p.47. Fortalezo, Brazilo, 2002

Koncize pri la aŭtoro

HU Guozhu, esperante plumnome Miĉino,
1938-02-03 naskiĝis en Wuhan, Hubei-provinco, Ĉinio.
Ekde 1955 laboris en tekstila fabriko kiel teknikisto,
1994 emeritiĝis kiel supera inĝeniero.

Komencis memlerni Esperanton 1956;
debutis kiel kunlaboranto de EPĈ 1959;
respondeca redaktoro de *Penseo* (1997~1999);
membro de UEA (1984-),
honora komitatano de ĈEL (1999/2004,2005-),
Prez. de Hubei-a Esperanto-Asocio (2001/2005,2006-),
membro de EVA (2004-).

Kontribuinto de <Fonto>, <La Riveroj>;

Kunlaboranto de <La Gazeto> (2005-) kaj <LKK>.

Honorita de ĈEL per "Speciala Premio" pro "Speciala kontribuo al la ĉina movado"
(2007-12-07)

speciala-numere

- * FONTO n-ro 266 (2003/2), la Speciala Numero de Hu Guozhu
- * FONTO n-ro 294 (2005/6), p.3~14: Kial mi amas Esperanton
- * PENSEO n-ro 175 (2006/5), Verdaj Spuroj en 50-jara Marŝo

Aŭtoro de

libroforme

- * *Esperanta Metriko* (1973, en la ĉina)
- * *Dek mesaĝoj pri Esperanta Metriko* (2008, du eldonoj en Esperanto kaj la ĉina)
- * (lernolibro) *Esperanta Elementa Kurso* (1992)
- * (primovada esearo) *Hushuoji* (HU Parolas Mal-delire, 2001)
- * (primovada esearo) *Shuoxiangji* (HU Laŭdas Verdakore, 2003, 2-a eldono 2004)
- * *Ŝlosilo de Ĉinesko* (2007)
- * *Ĉina Galerio*, 108 rondeloj de Guozhu (2008)



Apendico

Bedaŭrante tion ke el la "100 Plej Famaj Esperantistoj " nur 13 eniris la poemaron <Rimportretoj>, la Galerion de Esperantaj Steloj versitan de Kalocsay 1931, Guozhu ankaŭ imite versis rondelon por Tonkin:



Rimportreto

Humphrey Tonkin, multe merita
ne nur en sia profesio.
Asocioj, akademio,
ankaŭ honoras lin elita.

kaj dankas pro frukto medita
pri la movada strategio.
Humphrey Tonkin, multe merita
ne nur en faka profesio.

Ĉarmas lia gvido invita
en UK al verda aŭkcio,
per saĝo kaj erudicio,
instruas ĉiam klare sprita.

Humphrey Tonkin multe merita.
(Guozhu. 2008-12-02)